

6



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JUNIO 1963

E N H A V O

	Paĝo
* * „Bulgara Esperantisto“ — efika organizilo de nia movado . . .	1
* * Tria Plenkunsido de CK de BEA	2
* * 48-a Universala Kongreso de Esperanto	4
* * Tria konferenco de MEM	5
Akademiano Vladimir Georgiev. Esperanto estas tre efika rimedo por komunikiĝoj inter la popoloj	6
D-ro Miĥail Popov. La bulgaraj sciencistoj-esperantistoj agas . . .	8
Emil Keremidĉiev. Junulara balo-festivalo	9
Dimitr Karagjozov. Propagando per kantoj	9
* * Kamarado Atanas Lakov — 60-jara	10
Orlin Orlinov. Rememoro pri insulo „Esperanto“ (versaĵo) . .	11
Hrisman. Vespero de la batalantoj	11
* * Tria altlernejo akceptis Esperanton	11
Atanas D. Atanasov — Ada. Dekoka leciono	12
TRA LA MONDO	13
ORGANIZA VIVO	16
Violin Oljanov. Lingvaj demandoj (sur la kovrilo)	

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm² ; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

**„BULGARA ESPERANTISTO“ —****EFIKA ORGANIZILO DE NIA MOVADO**

La gazeto estas la baza instrumento de ĉiu ajn organizaĵo por interligo de la apartaj ĉeloj, de la membroj. Ĝi mobilizas por la plenumo de la asociaj taskoj, de la kongresaj decidoj. La gazeto estas la plej grava ĉenero en la agado de ĉiu organizaĵo. Ĝi transportas la instrukciojn de la centraj organoj al la membroj, sciigas iliajn decidojn pri la organiza vivo, interŝanĝigas la sperton de la lokaj organizaĵoj.

Nia presorgano „Bulgara Esperantisto“ havas jam sian 32-an jaron. Ĝi plifortiĝis kaj aperadas regule. Ĝia enhavo pliboniĝis kaj variigis. Ĝiaj sukcesoj des pli reliefigas pro la fakto, ke ĝi ne havas salajratan redaktaron kaj alian personaron, por ĝia eldonado oni pagas neniajn salajrojn kaj honorariojn. Tiu ĉi lasta cirkonstanco estas tre pozitiva, ĉar montras la tradician idealismon de nia movado, de nia anaro. Sed ĝi kaŭzas ankaŭ iujn malfacilaĵojn. La redakcio malfacile varbas aŭtorojn, aparte spertulojn, pro kio ĝi estas limigita en la pliriĉigo kaj plivariigo de la enhavo, en la plibonigo de la ekstera aspekto. La societoj devas helpi tiurilate. Unua devo de ĉiu societo estas nomi regulan korespondanton de BE. Li devas esti klera homo, bona esperantisto, kiu havas inklinon al ĵurnalista laboro. La estraroj devas konstante observi la laboron de la korespondantoj kaj helpi al ili. Oni devas elekti el la multaj faktoj la plej gravajn, la plej interesajn, kiujn povus utiligi la alilokaj esperantistoj. Ne sufiĉas diri, ke estas malfermita kurso, aŭ okazis amuzvespero, aŭ ekskurso. Tiaj aranĝoj okazas ĉie kaj ĉiam kaj ne estas senco sciigi pri ili. Sed se oni farus analizon de la rezultoj de finita kurso, se oni esplorus la kaŭzojn pri bona aŭ malbona sukceso, pri la defalo de la kursanoj, jen tia korespondado estus utila por ĉiu societo.

Bone efikas la kritikaj korespondadoj pri neaktivaj estraroj, pri maltrafa propagando, pri ne bona gvidado de kursoj ktp. Ili donus utilan rezulton, se oni pridiskutis ilin en la societo.

Ne estus malutile, se iu societo havus pli ol unu korespondanton. Tio plivariigus la sendatajn materialojn, la korespondantoj povus kontroli reciproke siajn korespondadojn, interkonsiliĝi. Ili kune kun la estraroj devas serĉi aŭtorojn pri diversaj temoj de nia movado. Ili estas tiuj, kiuj iniciatos pridiskuton de nia presorgano en la societoj. Tiaj pridiskutoj helpas multe la redakcion pri la plibonigo de la gazeto. Antaŭnelonge la sofia societo „M. Gorkij“ organizis tian pridiskuton, kiu pro la granda intereso kaj multaj partoprenantoj daŭris dum du kunvenoj. Oni faris dekojn da

proponoj, kiujn la redakta komitato nun pristudas kaj la konvenajn akceptos. Similajn pridiskutojn oni devas organizi ankaŭ en aliaj societoj. Sed por ke ili estu rezultodonaj oni devas sufiĉan tempon antaŭe sciigi la redakcion kaj bone ilin prepari. La redakcio penos sendi sian reprezentanton. Utilas ankaŭ leteroj de privataj esperantistoj al la redakcio kun pritakso, proponoj ktp.

Ne estas sensignifa la pligrandigo de la abonintaro. La kurantan jaron ni atingis bonan sukceson tiurilate. Ni havas pli ol 2700 abonintojn. Sed kompare al la progreso de nia movado kaj al la nombro de nia membraro, tiu ĉi kvanto tute ne sufiĉas. Des pli, ke 405 estas eksterlandaj. Do, la societoj nepre abonigu ĉiujn novajn esperantistojn por la dua jarĉuono. Honore al la Kongreso ni atingu 3000 abonintojn. Tio estas reala kaj dependas nur de ni.

TRIA PLENKUNSIDO DE CK DE BEA

Je la 18-a de majo j. k. okazis plenkunsido de CK de BEA kun jena tagordo:

1. Pri la internacia korespondado.
2. Informo pri la 48-a UK de Esperanto.

Partoprenis la membroj de CK, de KK, de la estraro de la Junulara Sekcio, de la estraroj de la sofiaj societoj.

Pri la unua punkto raportis Trajana Petkova, estrarano de CK de BEA. Pri la problemoj de la internacia korespondado parolis multaj el la ĉeestantoj. Pri tiu punkto la plenkunsido akceptis rezolucion, kiun ni publikigas aparte.

Pri la dua punkto raportis Nikola Aleksiev, prezidanto de LKK de la 48-a UK. Parolis ankaŭ la konstanta kongresa sekretario G. G. Pompilio, akceptita kun aplaŭdoj.

РЕЗОЛЮЦИЯ

Пленумът на Централния комитет на Българския есперантски съюз, състоял се на 18 май 1963 г., след като изслуша и обсъди доклада на тема: „Да организираме активно и ползотворно международно кореспондиране“

КОНСТАТИРА:

В изпълнение решенията на историческия Осми конгрес на Българската комунистическа партия по идеологическата работа за засилване на международните връзки, за укрепване на международната солидарност в защита на мира, Българският есперантски съюз е полагал непрестанни грижи за развитието на индивидуалното и колективното кореспондиране.

Дружествата и отделните есперантисти в своите кореспонденции с чужбина допринасят за засилване на международните връзки, за популяризиране успехите на нашата родина в изграждането на социализма. Изпращани са индивидуални и колективни писма, които са четени в чужбина, печатани са в различни вестници и списания, уреджани са български вечери и изложби. Получаваните от чужбина писма, особено от социалистическите страни, също са използвани за стенвестници, витрини и пр.

Пленумът счита, че извършваната работа чрез международното колективно и индивидуално кореспондиране е недостатъчна и не отговаря на ръста на есперантското движение и задачите, които постави Осмия конгрес на БКП.

За подобряване на работата, за превръщане на международното индивидуално и колективно кореспондиране в патриотично движение за създаване на международни връзки, за възпитание на есперантистите в дух на международна солидарност и борба за защита на мира, пленумът

РЕШИ :

1. Към отдела за международно кореспондиране при ЦК на БЕС да се организира комисия със сектори :

- а) за индивидуално кореспондиране ;
- б) за колективно кореспондиране.

2. Ръководствата на есперантските дружества да използват широко съвместните окръжни на ЦК на БЕС с ЦСПС и Димитровския комунистически младежки съюз. Кореспондирането да се организира под непосредственото ръководство на дружествените председатели и секретари.

3. Всяко дружество да определи отговорник за индивидуално и колективно кореспондиране, който ще работи по предварително приет от дружеството план. В плановите да залегнат важни и навремени задачи.

4. Към ЦК на БЕС да се организират секции на юристи, географи, архитекти и инженери. Старите секции да се активизират и да почнат оживена кореспонденция — индивидуална и колективна по примера на секцията на медицинските работници.

5. Есперантските дружества да се свържат с местните комитети за мир и да изработят съвместни планове за работа — кореспондиране с чужбина, уреджане изложби и пр.

6. Местните дружества да организират колективна кореспонденция между наши български предприятия и кооперативни стопанства и предприятия в чужбина, като организират курсове в нашите предприятия.

7. Дружествата да организират планово международно кореспондиране между учениците и студентите.

8. Комисията за международното кореспондиране при ЦК да организира набиране и раздаване на адреси (Ора списко).

9. „Булгара есперантисто“ системно да помества директиви и статии, извадки от интересни писма, опита на отделни есперантисти в международното кореспондиране и материали за практическо ръководене на международната кореспонденция.

10. ЦК на БЕС да активизира връзките си със съюзите в чужбина, да организира чрез дружествата вечери на писмата, изложби, да засили връзките си с масовите организации — работнически, женски, читалища и пр.

11. ЦК на БЕС да организира редовното сътрудничество в чуждестранни есперантски списания.

12. Да се използват интересни материали от международната кореспонденция за нашите вестници и списания (на български език).

13. ЦК на БЕС от новата 1964 г. да започне издаването на месечно издание в 4 страници малък формат на български език със специална задача да изработва въпросите на международното кореспондиране, а също и да печата получени от чужбина интересни писма.

14. ЦК на БЕС да активизира отдел „Пропаганда“, като създаде магнетофонен сектор, който да изготвя $\frac{1}{2}$ -или 1-часови програми за чужбина и подготви издаването на грамофонни плочи, брошури и пр.

14. Българската есперантска кооперация да изготви и издаде няколко вида значки, албуми, диплянки, картички, пликосе и сувенири на есперанто.



LA KONGRESO

ALPROKSIMIĜAS

La templimo por aliĝoj jam pasis kaj nenian escepton oni povus fari. La kongresajn aranĝojn oni povos viziti nur montrante kongreskarton. La servojn de LKK ankaŭ oni povos ricevi nur kontraŭ kongreskarto. La kondiĉojn de la oratora konkurso ni sciigis en n-ro 1 de BE. Ni esperas ke la bulgaraj junuloj, kiuj jam montris kapablon dum la junularaj baloj prezentos digne nian Esperanto-junularon.

Loĝado en Sofio. La loĝiga servo de la kongreso certigas por ĉiu mendinto loĝadon dum la kongresa semajno. Ĝi tamen ne povas certigi la plenumon de la deziroj de la malfruaj mendintoj. Pro tio estas konsilinde sendi kiel eble plej baldaŭ la koncernan mendilon por loĝado.

Mendoj, kiuj alvenos post la 10-a de julio, ne estos akceptitaj.

I. S. U. La Estraro de U. E. A. decidis, ke la prelegoj de la Internacia Somera Universitato estu jenaj:

- a) D-ro Victor Sadler: „Ĉu kulturoj aŭ kulturo?“
- b) Prof. Gaston Waringhien: „La ellaborado de Esperanta leksikologio.“
- c) Prof. Petr. Dinekov: „Evoluo de la bulgara literaturo.“
- d) Fino Mag. Marjorie Boulton: „Metaforo, kliŝoj kaj slango.“
- e) Prof. Stojan Ĝuĝev: „La muziko da la lingvo.“
- f) S-ro Josip Vrančić: „Mezepokaj murpentraĵoj de Serbio kaj Macedonio kaj ilia signifo en eŭropa arthistorio.“
- f) D-ro Tadeusz Wólcik: „La racia muzikskribo.“



g) S-ro Boris Kolker: „Rezultoj de permaŝina tradukado el la rusa lingvo en Esperanton.“

Aliĝoj. Ĝis la 10-a de junio aliĝis 3000 personoj el 40 landoj.

TAGORDO DE LA FAKKUNSIDO DE LA UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO- ASOCIO DUM LA 48 UK

Dum la unua tago:

1. 9—9.15 h. Salutparolado.
2. 9.15—10 h. Raporto de la estraro de UMEA.
3. 10—10.30 h. Organizaj aferoj, liberaj proponoj k. a.
4. 10.30—11.30 h. Fakaj referaĵoj.
5. 11.30—12 h. Eldiroj.
6. 15—19 h. Promeno tra la urbo — vizito al vidindaĵoj.

Dum la dua tago:

1. 7—8 h. Vizito al la gimnastikantaj maljunuloj en la Parko de la libero.
2. 8—9 h. Iro al medicina institucio.
3. 9—12 h. Vizito al malsanulejo.
4. 15—17 h. Vizito al la Ministerio de la Sanprotektado kaj Sociaj Zorgoj.

Dum la tria tago:

Ekskurso — laŭvole.

Sciigoj:

Kursoj de Esperanto funkcias: En Sofio — 2 kursoj: 1) de medicinistoj ĉe la Domo de la Medicinistoj — partoprenas 10 gekursanoj; la kurso estas gvidata de D-ro St. Kadiev; 2) ĉe la Sciencsplora Kemi-farmakologia Instituto — partoprenas 17 gekursanoj; kursgvidanto D-ro N. Donev, sciencia kunlaboranto.

En Nova Zagora — kurso ĉe la Urba Unuigita Malsanulejo — partoprenas 10 gekursanoj; kursgvidanto D-ro Trifonov.

Profesoro D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de UEA alvenos por la 48 UK en Sofio je la 30 de julio k. j. je 18. 10 h. ĉe la flughaveno.

TRIA KONFERENCO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

En la kadro de la 48-a UK de Esperanto en Sofio okazos la Tria Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado. La provizora tagordo estas:

1. La 3-an de aŭgusto k. j. okazos la unua kunsido de la Internacia MEM-Komitato (16—18 h). Ĝi estas deviga nur por la komitatanoj de la landaj MEM-Sekcioj kaj la landaj MEM-Perantoj. Oni diskutos la tagordon kaj la manieron de okazigo de la konferenco.

2. La 5-an de aŭgusto k. j. (15—18 h) okazos la oficiala inaŭguro de la Tria Konferenco de MEM. Unue parolos la prezidanto de la Bulgara Packomitato akademiano Georgi Naĝakov pri „La aktualaj taskoj de la esperantistaj pacbatalantoj“ (15 minutojn). Poste raportos la Ĉefsekretario de Internacia MEM-Komitato k-do Anton Balague pri „La dekjara datreveno de la fon-

digo de MEM kaj ĝia oficiala presorgano „Paco“ (20 minutojn). Fine raportos la prezidanto de la statuta komisiono. Li prezentos la projekton de statuto.

3. La 6-an de aŭgusto k. j. okazos la dua kunveno de la konferenco (9—20 h). Okazos diskutoj pri la aŭditaj raportoj kaj la landaj komisiitoj konigos sian sperton el la ĝisnuna agado. Ili faros rekomendojn por plibonigo kaj perfektigo de la funkciado de la varbado kaj propagando. En la fino oni elektos novan Internacian Komitato de MEM, Kontrolan kaj Redaktan Komitatojn.

La Konferenco okazos en unu el la grandaj aŭditorioj de la Sofia Ŝtata Universitato „Kliment Ohridski“. Vidu la ĝeneralan programon de la kongreso en la kongresa libro! Se okazos la ŝanĝo bonvolu atenti even-

ESPERANTO ESTAS TRE EFIKA RIMEDO POR KOMUNIKIĜOJ INTER LA POPOLOJ

Другарят Дончо Хитров, член на ЦК на БЕС по поръчение на редакцията на сп. „Nuntempa Bulgario“ е взел интервю от академик Владимир Георгиев, заместник председател на БАН, виден езиковед.

Тук публикуваме въпросите и отговорите на акад. Георгиев.

— Какво е мнението Ви за есперанто като опит да се използва и обобщи езиковото богатство на народите? Считате ли, че есперанто има развитие и приложение като езиково средство за общуване и за размяна на информация от различно естество?

— Аз съм горещ защитник на есперанто и смятам, че той трябва да намери най-достоеен прием в нашия живот. На международния конгрес на езиковедите в Париж през 1948 г. говорих за развитието на есперанто и защитих идеята да се въведе неговото изучаване в учебните заведения наравно с другите чужди езици, в което намерих подкрепа от известни съветски, френски, китайски и италиански езиковеди.

За нас българите, а така също и за народите от Азия, Африка, скандинавските страни и др. есперанто е език, който може да бъде много леко усвоен и използван с успех за установяване на международни връзки. За народите от славянската група, до чийто речников фонд езици като английския, френския и др., придобили качеството на международни, са по-далечни и по-трудно се усвояват, есперанто е най-ефикасно средство за общуване между народите. Трябва да се подчертае, че в сравнение с който и да е друг национален език есперанто може да се



Ĉi apude ni donas en bulgara lingvo la eldiron pri Esperanto, kiun Akad. Prof. D-ro Vladimir Georgiev faris al intervjuinto de la revuo „Nuntempa Bulgario“; tiu ĉi eldirdo aperis en Esperanto en „Nuntempa Bulgario“ N 7—8/1962, kaj ankaŭ en „Heroldo de Esperanto“ N 2/1963.

En ligo kun tio ni konsideras utile kaj necese doni kelkajn informojn pri la personeco de la eminenta amiko de Esperanto.

Vladimir Georgiev (naskita la 3-an de februaro 1908) per siaj altvaloraj sciencaj studoj estas tutmonde konata. Li enkondukis novan manieron de apliko de la komparahistoria metodo en la lingvoscienco. Per tiu metodo li pruvis, ke sur la Balkana Duoninsulo iam ekzistis unu antikva pralingvo, kiun la specialistoj nomas „Georgiev-lingvo“ („Georgiewsche Sprache“). Vico da

tualan afiŝon ĉe la ĉefa enirejo de la kongresejo!

Bulgaraj geesperantistoj, bonvolu amase viziti la kunvenojn de la Tria Konferenco de MEM! Estas dezirinde, ke la esperantistaj societoj komisiu siajn specialajn reprezentantojn, kiuj

salutos la Konferencon kaj prezentos siajn proponojn kaj opiniojn pri la starigitaj problemoj. Klopodu venigi ankaŭ viajn eksterlandajn amikojn al la konferenco. Mendu gustatempe loĝejon!

Bulgara Komitato de MEM

научи най-бързо и най-лесно и от хора с малка езикова култура.

Никога преди в нашите учебни заведения не са се учили толкова много чуждестранни студенти, както сега. Техният брой вече е над 1000 и като се имат предвид различните страни, от които те идват и разнотообразието на езиците, които говорят, считам, че есперанто би могъл да послужи като езикова база за общуване между тях и нашите студенти в процеса на изучаване на българския език.

В многонационалния действен фонд влизат нови и нови езици, което е резултат от процеса на формиране на нови независими държави в африканския и азиатския континент, а това създава още повече затруднения в езиковото общуване между тях.

Представете си например, че сте научен работник в областта на химията. В света се издават повече от 10 хиляди научни списания по проблемите на химията на най-различни езици. И най-добре обзаведената и функционираща служба за научна информация не би могла да осигури превода на най-интересните публикации. Ако научната информация се разменяше на един език — и то на най-леко усвоимия, какъвто е есперанто, тогава множество ценни изследвания и открития щяха да станат достояние на значително по-голям брой работници в дадена област на науката.

Освен това, като помощен език, есперанто успешно може да се използва и наистина се използва за чисто практически цели — в търговията, туризма, международни срещи, конгреси и т. н.

— Възможно ли е и какво, според Вас, трябва да се направи, за да се въведе в нашите учебни заведения изучаването на есперанто, както това вече е осъществено до известна степен в Полската народна република, в Китайската република, в Дания, Финландия и в други страни?

— Според мен, главната цел сега е да се изучава есперанто масово в курсове и кръжоци, за да се потвърди неговото леко усвояване и неговата действеност. Изучаването на есперанто би могло да се въведе в един-два от горните класове на средните училища два часа седмично, като се има предвид, че учебната програма и без друго е твърде претрупана. Ре-

sciencistoj de tiu fako en diversaj landoj prilaboras la principojn starigitajn de Vladimir Georgiev. Li estis unu el la unuaj, kiuj donis sukcesan kontribuon por decifrado de la Kreta-Mikena skribo. La listo de liaj verkoj estas sufiĉe impona; ni citu nur kelkajn gravajn verkojn skribitajn ĉu en bulgara, ĉu en germana, ĉu en rusa aŭ franca lingvoj: „Studoj pri kompara-historia lingvoscienco“, „Demandoj de la bulgara etimologio“, „Bulgara etimologio kaj onomastiko“, „Antaŭgreka lingvistiko“, „La traca lingvo“, „La malnova toponimio de la Balkana Duoninsulo kaj la Mediteranea tezo“, „Hetita kaj Etruska lingvoj“ (la hetita deveno de la etruska lingvo), „La du lingvoj de la Kretaj surskriboj en Linearo A“ ktp. Li redaktas la altsatatan fakan periodaĵon „Balkana Lingvoscienco“ („Linguistique Balkanique“), kiu publikigas artikolojn de eminentaj diversnaciaj fakuloj en diversaj lingvoj. Interalie Vl. Georgiev gvidas kaj redaktas la nun eldonatan „Bulgaran Etimologian Vortaron“ kaj estas ĉefredaktoro de la nun presata „Malgranda (nedetala) Bulgara Enciklopedio“ (eldono de la Bulgara Akademio de la Sciencoj).

Vl. Georgiev estas membro de la Bulgara Akademio de la Sciencoj kaj ĝia vicprezidanto, profesoro de la Sofia Ŝtata Universitato kaj ties eksrektor. Li estas doktoro de la Universitato de Vieno kaj honora doktoro de la Universitato de Berlino.

Kiel estas videble el liaj eldiroj, akademiano Georgiev estas partiano de Esperanto. Jam kiel malgranda knabo li havis okazon en la urbeteto Bjala Slatina viziti kelkajn lecionojn en Esperanto-kurso por civitanoj. Kiam li estis gimnaziano en Varna, Esperanto estis oficiale instruata kiel nedeviga lernobjekto; Vl. Georgiev estis en klaso malpli alta ol tiu, en kiu oni instruis Esperanton, tamen li trovis manieron viziti la lecionojn kaj lerni la elementojn de la lingvo. Li estas sensancela defendanto de Esperanto kaj multloke donas al ĝi valoran subtenon. La signifon de lia subteno ni povas

zulatatite несъмнено ще бъдат положителни, а това ще бъде сериозен аргумент в полза на есперанто.

Най-добре би било, ако ЮНЕСКО при ООН би препоръчала на държавите-членки да въведат есперанто най-малко в един клас във всички учебни заведения. Това ще бъде извънредно важна стъпка и принос в общуването на народите, в размяната на разнообразна информация.

— Вие знаете ли есперанто?

— Разбира се, че го знам, щом имам мнение за него и излизам в негова защита.

kompari kun la grava apogo, kiun donis antaŭ duona jarcento al la Bulgara Esperanto-Movado alia eminenta sciencisto — Prof. D-ro Ivan D. Siŝmanov.

La bulgaraj esperantistoj devas gardi en siaj koroj senton de profunda dankemo al tiuj ĉi du bravaj viroj, kiuj ne hezitis doni sian senrezervan apogon al unu afero, atakita de multaj flankoj, havante ĝustan komprenon pri ĝia granda signifikop por la progreso de la popoloj.

Ada

EL LA VIVO DE LA BULGARAJ SCIENCISTOJ-ESPERANTISTOJ

Pritraktante la grandajn obstaklojn kaj maloportunaĵojn en siaj sciencaj kongresoj, konferencoj, renkontoj kaj aliaj en internaciaj rondoj, entreprenoj, kiujn oni renkontas pro manko de komuna lingvo, grupo da bulgaraj sciencistoj-esperantistoj decidis fondi organizaĵon por uzo kaj disvastigo de la internacia lingvo inter la sciencistoj.

En sia plenkunsido dum novembro 1962 la estraro de la Asocio de la Sciencistoj en Bulgario pridiskutis la peton de la menciita grupo pri fondo de aparta sekcio de la sciencistoj-esperantistoj en la kadroj de la asocio kaj unuanime aprobis ĝin.

La 28-an de novembro 1962 okazis la fonda kunveno de la sciencistoj-esperantistoj en la salono de la Supera Inĝeniera Konstrua Instituto. En la kunveno partoprenis 23 sciencistoj kaj 5 gastoj. Krom tio oni sciigis, ke persone aŭ per telefono sin deklaris kiel membrojn-fondintojn ankoraŭ 20 aliaj sciencistoj-esperantistoj. En tiu nombro estas 4 membroj de la Akademio de la Sciencoj, 5 membroj-korespondantoj de la sama, 10 universitataj profesoroj k. t. p.

La prezidanto de la provizora komitato prof. inĝ. V. Peevski, vicrektoro de la Supera Inĝeniera Konstrua Instituto, per mallonga prelego emfazis la neceson de enkonduko de Esperanto en la sciencon kaj la ĝisnunajn sukcesojn tiurilate de la internacia lingvo.

En la kunveno oni unuanime decidis fondi Esperanto-Sekcion de la Sciencistoj ĉe la Asocio de la Sciencistoj en Bulgario.

La kunveno akceptis regularon por la celoj kaj la agado de la sekcio. Ĝia ĉefa celo estas: uzi la internacian lingvon en la internaciaj rilatoj de la sciencistoj diverslandaj

kaj eldoni resumojn de sciencaj verkoj, traŭduki en Esperanton signifoplenajn verkojn, popularigi per Esperanto la atingitaĵojn de la bulgaraj sciencistoj, kontakti siajn membrojn kun alilandaj sciencistoj kaj sciencaj unuigoj k. t. p.

La kunvenintoj unuanime elektis por estraranoj: Prof. Inĝ. V. Peevski — prezidanto, Prof. D-ro St. Ĝuĝev — vicprezidanto, Supera Scienca Kunlaboranto D-ro M. D. Popov — sekretario, Prof. P. Dinekov, membro-korespondanto de la Sciencakademio, Supera Scienca Kunlaboranto D-ro T. Todorov.

Laŭ la decido de la estraro, kiu preparolis 6-monatan planon, la unua ĝenerala kunveno okazis la 28-an de decembro 1962 en la sama salono. En tiu ĉi kunveno oni diskutis la planon, kiun oni akceptis, oni aŭdis la prelegon de Prof. D-ro Ĝuĝev de la Ŝtata Konservatorio, pri la lingvo kaj la muziko. Ĉeestis 30 membroj. La prelego estis tre interesa kaj vekis multajn demandojn kaj diskutojn.

La 15-an de marto 1963 okazis la dua ĝenerala kunveno kun prelego je temo „Nutraj venenoj“ de d-ro M. Tonev, Supera Scienca Kunlaboranto. La prelego estis same kiel la unua trege interesa kaj provokis multe da demandoj kiel flanke de la kuracistoj, tiel ankaŭ de ceteraj. Per tiu prelego oni montris, ke nia lingvo estas tre preciza kaj taŭga ankaŭ por la medicina scienco.

Intertempe la prezidanto de la sekcio Prof. Inĝ. Vasil Peevski estis rekonita kiel rektoro de la Internacia Somera Universitato.

La 21-an de februaro 1963 estis solene celebrata en la salono de la Bulgara Akademio de la Sciencoj la 60-a datreveno de la elstara bulgara sciencisto-geodezisto akademiano Prof.



JUNULARA BALO-FESTIVALO EN VARNA

Kiel bona tradicio la 13-an kaj la 14-an de majo j. k. en nia belega ĉemara perlo-urbo Varna okazis la IV-a tutlanda junulara balo-festivalo. Denove gejunuloj el ĉiuj partoj de nia patrolando kolektiĝis kaj pasigis du tagojn neforgeseblajn en amuzo, dancante, kantante kaj diskutante. La plej grava evento en la balo kompreneble estis la arta festivalo, kiun partoprenis preskaŭ la kvarono de la 200 ĉeestantoj.

La unuan premion de la estraro de Bulgara Esperantista Junularo akiris la amatoraj artistoj de la dommastroj kaj la duan — la arta kolektivo de urbo Stara Zagora. Plej multe da aplaŭdoj ricevis la ĉarma junpionira Esperanto-dancgrupo de lernejo „Haĝi Dimitr“, Varna, prezentinte sin per gajaj rusaj popoldancoj.

La oratoran konkurson ree gajnis la konstanta oratorkonkurso gajnanto Ĉalâkov el Burgas.

Ĉi-jare la balo-festivalo ne estis tiel amase vizitita, kiel la pasintaĵn jarojn. Por tio kontribuis diversaj objektivaj kaŭzoj kaj ankaŭ iuj eraroj de la dommastroj — organizantoj de la balo.

Malgraŭ tio, la balo-festivalo de la junaj bulgaraj esperantistoj en Varna pasis bone kaj plensukcese. Por la bulgara junularo esperantista ĝi estis samtempe ĝenerala provo por la alproksimiĝanta 19-a TEJO-Kongreso en Vraca.

Nun ĉiuj fortoj de nia esperantista junularo estas streĉitaj por la bonega organizado de la Internacia Junulara Kongreso kaj de la aliaj junularaj Esperanto-manifestacioj, okazontaj dum la 48-a Universala Esperanto-Kongreso en Sofio.

Emil Keremidĉiev

PROPAGANDO PER KANTOJ

Esperanto estas potenca ilo en la batalo por paco, ĉar ĝi kunhelpas la proksimiĝon de la plej humanaj kaj noblaj ideoj. Unu el la bonaj formoj de propagando estas la kantoj. Kantoj kun ideo motivo por seriozaj koncertoj aŭ tiaj kun danca karaktero, kiujn la junularo preferas!

Mihail Zdravev, membro de la poŝtista Esperanto-societo „Heroldo“ en Sofio, estrada aktoro, verkas kaj interpretas siajn originalajn kaj fremdajn kantojn en esperantaj amuzvesperoj. Per sia repertuaro li prezentas en ĝeneralaĵ koncertoj al diversa publiko kantojn ankaŭ en Esperanto. Post la koncertoj k-do

Zdravev havas okazojn kontakti kun aŭskultintoj kiuj mem venis al li kaj ekdeziris fariĝi esperantistoj, petante lin liveri al ili lernolibrojn.

Tiun propagandan agadon Mihail Zdravev plenumas laŭ sia iniciato, kiel helpema esperanta propagandisto. Lia iniciato meritas subtenon speciale pri la popularigo de la kantoj.

En la Esperanto-movado ne estas multaj aŭtoroj kaj interpretantoj de esperantaj kantoj kaj pro tio la apero de aktoroj kiel Zdravev vekas ĝojan senton.

Dimităr Karagjozov

(daŭrigo de pĝ. 8)

Vladimir Kirilov Ĥristov, membro de la esperantista sekcio de la Asocio de la Sciencistoj en Bulgario. La jubileulo estis dekoraciita per la alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“. I grado kaj estis gratulita flanke de multaj

sciencaj institutoj kaj apartaj personoj. Samtiel li estis varme gratulita ankaŭ en la nomo de la sekcio de la esperantistoj-sciencistoj.

D-ro Mihail Popov



Kamarado Atanas Lakov, vicprezidanto de BEA, naskiĝis la 17-an de junio 1903 en vilaĝo Sadovec, distrikto de Pleven. Esperanton li lernis dum 1922. Kaj dum pli ol 40 jaroj li restis fidela al nia lingvo kaj movado. Ankoraŭ kiel lernanto en la gimnazio li partoprenas la studrondetojn de marksismo, kaj dum 1921—1924 li jam estas membro de la Bulgara Komunista Gejunulara Unuiĝo kaj sekretario de la komso-mola societo en Sadovec. En 1927 li aliĝas al la Bulgara Laborista Partio. Dum la tuta faŝista reĝimo k-do Atanas Lakov partoprenas en la kontraŭfaŝisma batalo pro kio li estis multfoje persekutita kaj arestita. En 1923 li fondis la plej fortan vilaĝan Esperanto-societon en la lando, kiun li gvidis kelkajn jarojn.

Kiel studento de agronomio dum 1928—1933 k-do Lakov disvolvas vigan progreseman kaj esperantan agadon. Li estis kunfondinto de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) kaj redaktoro de ties organo „Balkana Laboristo“. Samtempe li partoprenas en la bataloj de la popola studentaro kaj ties organizaĵo — Bulgara Ĝenerala Studenta Asocio (BONSS). Li kunlaboris ankaŭ al la bulgarlingva dusemajna ĵurnalo de BuLEA „Internacia Lingvo“. Dum tiu periodo li verkis kaj publikigis multajn artikolojn kaj tradukis poemojn kaj versaĵojn de elstaraj bulgaraj poetoj proletaj. En kunlaboro kun Asen Grigorov kaj Hristo Gorov li tradukis la plej belajn poemojn de Hristo Smirneniski, kiujn BuLEA aperigis en 1931 en aparta libro. K-do Lakov kunlaboris ankaŭ sub diversaj pseŭdonomoj al multaj internaciaj Esperanto-gazetoj kaj revuoj, kiel „Esperanto“ de UEA, „La Nova Epoko“, „Sur posteno“, „Internaciisto“ k. a.

K-do Lakov gvidis plurajn kursojn. Dum sia multjara modesta, sed rezultodona esperantista agado de Esperanto por laboristoj kaj kamparanoj li estis unu el la organizintoj de la internacia korespondado, helpante al la klasbatalaj gazetoj kaj ĵurnaloj akiri per Esperanto valorajn materialojn el fremdlando, precipe el USSR. Sian peresperantan kaj poresperantan laboron li ĉiam subigis al la batalo kontraŭ la faŝista reĝimo por paco kaj libereco.

Lia studenta loĝejo kaj poste lia domo estis ĉiam malfermita por partiaj funkciuloj, kie ili trovis fratecan helpon. Lia amplena koro ĉiam pulsas kun la ritmo de la bataloj de la laborista klaso, kies fidela filo li estas.

Nun kiam nia socialisma lando prosperas kaj disfloras, kiam nia enlanda Esperanto-movado pli kaj pli disvastiĝas, nia kara kaj ŝatata k-do Atanas Lakov, senlace kaj verve laboras por novaj sukcesoj de la movado, por la finkonstruo de la socialismo en nia lando.

Kara k-do Lakov, ni gratulas kaj dankas vin, pro via multjara modela kaj sindona laboro por Esperanto kaj por la socialismo kaj bondeziras al vi longan vivon por la prospero de nia komuna afero.

REMEMORO PRI INSULO „ESPERANTO“

Mi vidis Nicon, Rivieron,
mi vidis Naplon — revo nun,
mantelo kiel el purpuro,
banita en la suna lum'.
En golf' de Portofino estis
mi, kie bluserena akv',
flustradas al migrant', majeste
samkiel voĉ' de Dalidà.*
Pompeon kaj Vezuvon gloraj,
kaj Vatikanon vidis mi,
sed ĉio kiel song' en foro
sub fremdĉielo restis bril'.

Sed malriĉulo senespera,
mi estus tie sur la tero,
kaj kvankam riĉa je impres',
fremdul' en mia hejm' ni estus,
se urbo unu en forges'
mankanta en l' atlasoj pezaj,
kaj sur la globoj de la mond' —
Orjahovo—

al mi ne donis
belajojn en amika rond'
kaj rememorojn por estont'...

Insulo eta „Esperanto“!
Pri ĉio dankas mi el kor' —

dum luna nokt', — maten' venanta,
kaj kiam ruĝo de l' aŭror'
orumas l' ondojn de Danubo,
kaj la flugantaj birdoj mil,
la ŝultrojn kaj la orajn buklojn
de la knabino nekonata
de iu nekonata ŝip'.

Insulo eta „Esperanto“!
Pri vi nenion sciis mi,
se tuj subite allogante
ne brilus vi ĉe mia vid',
per la salikoj gaje verdaj,
per via sablo — vera or'...
Moment' de lumigitaj sentoj, —
vi ĉiam restos en memor'!
Ĉu vi jam vidis „Esperanton“?

Se estis vi ĉe tiu bord'
al ĝi l' animo sopiranta
denove logos vin kun fort'.
Kaj poste ankaŭ por Sorento,
por Portofino, por la mond'
ne ŝangos vi de „Esperanto“
belecon ĉarman, en respond'.

El la bulgara: At. Lakov

*) Franca kantistino, plenumanta kanton
pri Portofino.

VESPERO DE LA BATALANTOJ

Kiam alvenis la lektoro, li sukcesis eniri
en la plen-plenan salonon nur tra la scenejo.
Esperanto-societo, partia komitato, patroland-
fronta kaj komsomola organizaĵoj — ĉiuj estis
sufiĉe laborintaj por ke Polski Trâmbeš tra-
vivu neforgeseblan vesperon.

Jen komenciĝis la programo — riĉa, varia,
entuziasmodplena. Pli ol 150 partoprenantoj en
la gimnazia ĥoro, esperantista baletto, belegaj
deklamadoj...

Sur tiu ĝoja kaj belaspekta fono eksonis la
parolado de nia asocia prezidanto Hristo Gorov.
Li rakontis elokvente pri la partizanaj taĉ-
mentoj, kiujn li mem partoprenis, pri la bra-
vaj esperantistoj — batalantoj por popola fe-
liĉo, pri la nunaj venkoj de la esperantista
kaj porpaca movado.

Ektondras aplaŭdoj: grupo da komsomolani-
noj kaj pioniroj ekstaras antaŭ k-do Gorov,
dankas ĥore pro la belaj vortoj kaj donacas
al li bukedojn de neĝblankaj galantoj.

La anoncita „Vespero de l' Batalantoj kon-
traŭ la Milito kaj la Faŝismo“ pasis plensuk-
cese. Nova venko de la loka esperantista so-
cieto „Progreso“. Nova pruvo, ke la popolo
estimas nian movadon.

Hrisman

TRIA ALTLERNEJO AKCEPTIS ESPERANTON

*Post la Svištova Supera Lernejo kaj
la Sofia Universitato, la Supera Ler-
nejo pri Ekonomio en Varna enkon-
dukis oficiale Esperanton kiel nede-
vigan lernobjekton. Ni gratulas la
studentojn-esperantistojn en la altler-
nejo de Varna pri la grava venko.*

NOVA VIVO

Dekoka leciono

Mi jam plene dronas en la esperantismo.

Io nova, belega, stranga, nepriskribebla enfluis en mian vivon. Mi partoprenas tutkore la vivon de tiu malgranda rondo de neviditaj sed karaj amikoj. Malmultaj povus supozi kaj kompreni la sentojn, kun kiuj mi partoprenas en tiu vivo. Ni ĉiuj sentas nin intime ligitaj inter ni. Rodrigues karakterizas nian malgrandan socion kiel beatan oazon, kie ni, lacigite de la teda ĉiutaga prozo, rifuĝas kaj povas spiri alian aeron, paroli kun amataj amikoj libere pri aferoj, kiuj nin altigas super la ĉiutaga banaleco. Ni estas homoj de la estonteco!

La zorgoj de ĉiu el ni estas partoprenataj de ĉiuj aliaj. Oni ekzemple atendas senpacience ekscii la rezultojn de la universitata ekzameno aŭ de la parlamentaj balotoj en Brazilo, ĉe kiuj Rodrigues kandidatiĝis. La antaŭpreparoj por la geedziĝo de Petersen estas komuna zorgo de la tuta rondo.

Kial Thomson silentas tiom longe? Jam multajn semajnojn ni ne legas liajn spritajn skribaĵojn. Evelina donas la klarigon: li estas grave malsana, kuŝas en malsanulejo. Nur ŝi povis ekscii tion. Petersen sendas al li kuracan specialaĵon, rekomenditan de konata al li kuracisto.

Sed jen Thomson estas denove sana kaj liaj vortoj eksonas en leteroj. Li intencas viziti Sudaŭfrikon. Li gastiras al Evelina.

Kaj jen la ĝojiga novaĵo: Evelina kaj Thomson gefianĉiĝis! Ilia korespondado finiĝis per amo. Baldaŭ ili estos geedza paro. Ili konkuras Petersen.

Nun Evelina estas por sia fianĉo jam Evenjo, kaj li por ŝi Goĉjo. Li skribas pri siaj novaj boparencoj, humore prezentante la vesperon de la gefianĉiĝo: bopatro, bopatrino, bofratino, bofratoj, eĉ la boonkloroj ne estas forgesitaj. Li laŭdas delikate sian bofratineton kaj aludas, ke iu el ni povus fariĝi lia bofrato. La gefianĉiĝo estas infekta malsano!

Vere, Rodrigues estas fraŭlo, sed nun li tute ne pensas pri tiaj aferoj. Li okupiĝas je studoj pri la politikaj kaj ideaj movadoj, pri la ekonomiaj sistemoj, eĉ pri la religioj: socialismo, kapitalismo, komunismo, feŭdismo, kristanismo, buddismo, islamismo...

Thomson, malgraŭ ke li naĝas en fianĉa feliĉo, trovis tempon sendi al li valorajn notojn pri la diversaj „ismoj“.

Tanaka deziras sendi al la fianĉino Evelina florojn. Sed ja ili velkus, ĝis ili atingos de Japanujo ĝis Sudaŭfriko. Kaj anstataŭ bukedon ŝi sendas... semojn de japanaj floroj. La ceteraj rondanoj sekvas la ekzemplon de Tanaka. Nun Evelina plantos en sia ĝardeno florojn de tiom da landoj kaj faros specialan „internacian bedon“.

Petersen kaj lia Manjo estas baldaŭ geedziĝontaj: ili certe rapidas, por ne esti antaŭitaj de Thomson kaj lia Evenjo! Tuj post la geedziĝo la Petersena paro faros vojaĝon al la Proksima Oriento — ilia revo realiĝos. Ĉe ilia reveno eble mi kuniros kaj ni triope iros al la universala esperantista kongreso. Ĉiuj rondanoj intencas viziti la kongreson.

Ĉu mi sukcesus atingi tion?

PROVERBOJ

Ne valoras bofilo, kiam mortis filino.
 Riproĉu la filinon, por ke komprenu la bofilino.
 Batu Ivanĉjon, por ne bati pli malfrue Ivanon.
 Antaŭ la geedziĝo Marinjo, post la geedziĝo — Hundino.

SUFIKSOJ

- ĈJ — aldonate al la unuaj 25 sonoj de vira nomo formas karesan nomon de tiu viro.
 Petro — Peĉjo, Ivan — Ivĉjo, Ivaĉjo aŭ Ivanĉjo.
 patro — paĉjo, frato — fraĉjo.
 NJ — sammaniere formas virinajn karesajn nomojn.
 Sofio — Sonjo, Mario — Manjo, Marinjo.
 patrino — panjo, fratino — franjo.
 ISM — signifas instruon, doktrinon, skolon, sistemon
 socialismo, esperantismo, kristanismo, katolikismo.

PREFIKSO

- BO — Kiam du personoj geedziĝas, ĉiuj parencoj de la nova edzo fariĝas boparencoj al la nova edzino, kaj inverse: ĉiuj ŝiaj parencoj fariĝas boparencoj al li. Do: lia patro estas ŝia bopatro, lia patrino — ŝia bopatrino, ktp.

EKZERCOJ

- Formu karesajn nomojn de: Georgo, Antono, Konstanteno, Teodoro, Eliza, Jozefina, Angĉla.
- | | | |
|----------|------------------------------|-------------------------|
| 2. Frato | } de edzino estas al la edzo |
.....
..... |
| Fratino | | |
| Onklo | | |
- Edzino de la filo estas al liaj gepatroj
 Edzo de la filino estas al ŝiaj gepatroj
- Se du viroj edziĝas al du fratinoj, tiuj viroj estas unu al la alia (reciproke)
 La edzino de ĉiu el ili ambaŭ estas por la alia
- La instruo (filozofio) de Tolstoj

	Platono	estas	
	Budao		

 La ideo Esperanto estas nomata
 La ideo Esperanto estas nomata

Tra la mondo

LETERO EL EGIPTIO

Elsie Parson skribis el Egipto:

Tie ĉi, en Egipto, mi havas pli da ebleco sidi kaj rigardi la homojn dum la ĉiutaga vivo, ĉar ĝis nun okazo starigi esperantan kurson ne sin prezentis al mi.

Do, matene mi iras al la butikoj de mia esperantista amiko, kaj tie sidas dum kelkaj horoj. Li estas vendisto de spicoj, herboj, sapoj kaj multaj interesaj varoj. La butikoj ne havas vitran fenestron, sed oni povus diri ke parto de la muro estas supren rulebla. . . Dum la tago la polvo facile envenas, sed tio ne estas grava, ĉar oni povas facile balai ĝin for.

Kelkaj knaboj havas tiun taskon; ili ankaŭ helpas alimaniere en la butikoj. La plej malgranda havas la taskon ŝlosi kaj malŝlosi la pordegon. Ankaŭ la knabo iras de tempo al tempo al la teo-vendisto por mendi glasojn da teo. La teo-portisto alvenas kun pleto sur kiu estas plena tenoto, glasoj, glasoj entenantaj sukeron kaj unu kulero, per kiu li mem kirlas la teon. Poste li revenas, kaj forportas la uzitajn glasojn.

Preterpasas homo. Mi vokas lin. Li estas ŝupoluristo. Ankaŭ, se oni volas li forportas la ŝuojn kaj post duon-horo revenos, la ŝuoj riparitaj kaj poluritaj — viaj malnovaj ŝuoj aspektas kiel nova paro.

Jen alproksimiĝas homo sur kies puŝveturilo estas speco de premilo, en kiun li puŝas pecojn da sukerkano kaj elpremas la sukron, kiun li vendas po-glase.

Rigardu tiun virinon. Sur la kapo ŝi portas grandan brasikon, ĉar en la manoj ŝi havas aliajn aĵojn.

Subite pluvas, kaj la vendisto kontraŭ nia butiklo tuĵ elmontras vend-espere plastajn pluvmantelojn.

Preteriras alia vendisto. Kun tuko sur la brako li foriras por sin lavi. La horo de la preĝo venas. Li revenas, demetas la ŝuojn, kaj faras la kutimajn preĝojn, kiujn ĉiu islamano ortodoksa faras kvinfoje ĉiutage. Preĝ-loko estas apud ni. Tie oni metas matojn sur la plankon, kaj iu viro kun bonsona voĉo kantas alvokon al la preĝantoj.

Eble mia tago kulminas en vizito al araba filmo kun mia amiko inter la horoj de 21.30 kaj noktmezo."

Elsie Parson

EL SOVETUNIO

Lastatempe okazis interesplena raporto de k-do K. Leonov pri la teruraĵoj de Buĥen-valda Internacia Koncentrejo (8 km. de Weimar) dum la lasta milito, kie li mem estis kiel militkaptito kaj partoprenis en la liberiga ribelo kontraŭ faŝistaj gardantoj antaŭ la fino de la pasinta milito.

K-dino N. Sulje konatigis al la ĉeestantoj la raporton de D-ro Malofejev el Kutaisi (Kartvelio) pri la kuracado de kancermalsanoj per homeopataj manieroj kaj rimedoj, kaj aplikado en tiu kuracado de higienaj kaj fizioterapiaj metodoj. Tiu ĉi speciala raporto estis legita dum la IV-a Esperanto-tendaro en Cesis (Estonio).

D-ro K. Lavrentjev prelegis tre interesan sciigon pri la sangardado en la tuta mondo.

K-do P. Ĉerņiŝkov el Dnepropetrovsk (Ukrainio) transdonis varman saluton de tieaj gesamideanoj, kaj rakontis pri sukcesa antaŭenpaŝo de Esperanta movado.

K-do Ŝilas el Vilnus (Litovio) salutis moskvanojn je nomo de vilnusaj esperantistoj kaj junularo. Li sciigis pri la sukcesoj de Esperanto-movado kaj diris, ke en junulara kafejo de Vilnus ĉiuj aŭde kolektiĝas esperantista junularo. En Vilnus, Poneveĵis, Kaunas kaj aliaj urboj funkcias esperantaj kursoj. Oni konkludas, ke turismo estas bona rimedo por disvastigo de Esperanto.

K-ino E. Vinter el Gorkij komunikis, ke en Domo de Klerigo, en Domo de Sciencistoj, en Instituto de Pedagogio funkcias esperantaj rondetoj, en kiuj partoprenas ne nur gejunuloj, sed ankaŭ veteranoj-esperantistoj.

K-do V. Hitun el Leningrado salutis la ĉeestantojn kaj rakontis pri sukcesa laboro en Domo de Sciencistoj kaj en Esperanto-klubo ĉe Palaco de Kulturo kaj Klerigo.

La vespero finiĝis per kutimaj interesaj anoncoj de la sekcia prezidanto D-ro E. Salnikov pri niaj pluaj planoj.

La 10. 2. 63 okazis vespero de malnovaj gesamideanoj (veteranoj). K-do I. Ivanov faris interesan kaj detalan raporton pri VEK-organizaĵo, kies iniciatanto estis M. Lewin en Dunstable (Anglio). En la vespero partoprenis multaj malnovaj gesamideanoj, kiuj decidis fondi Veteranan Esperantistan Grupon en kadro de Esperanta Sekcio ĉe CDKM. Oni ankaŭ esprimis deziron sendi gratuleteron al S. P. Titov (patro de kosmonaŭto) koncerne al lia letero en brazila revuo, kaj inviti lin aniĝi al VEK. Same oni proponis oficialigi filion de VEK kaj informi pri tio s-ron M. Lewin.

La 17. 2. 63 okazis vespero de junularo, aranĝita per junaj esperantaj gastoj el Kolomna (apudmoskva urbo). Ing. A. Zajdman skize raportis pri vigla Esperanto-movado tie, kie laboras kelkaj esperantaj rondetoj en Kulturpalaco de Maŝinkonstrua uzino, en mezlernejo, en urba biblioteko kaj en Pedagogia Instituto. Oni aranĝas esperantajn kursojn, propagandvesperojn, fotoekspoziciojn, kolektivan korespondadon ktp.

Poste per junaj fortoj de kolomnaj gesamideanoj estis prezentitaj du unuaktaj teatraĵoj: „Nokta tragedio“, kaj „En vagono“, kaj recititaj en Esperanto versaĵoj kaj rakontoj.

La vesperon ĉeestis gastino el Anglio Miss Irene Tunstall, kiu tuktore salutis la ĉeestantojn, kaj transdonis la bondezirojn. K-do N. Rytjkov rekomendis samgeŝmonon Ir. Tunstall kie fervoran esperantistinon kaj direktorinon de unu solida firmao, kiu spite ĉiuj premoj de la registaro, ne ŝatas la ideon de komuna merkato kaj volas libere komerce rilati kun Sovetunio, ĝuste pro tio ŝi venis Moskvon. Poste li gratulis la aktivulojn de Kolomna, kiuj hodiaŭ sukcese faris prezentaĵojn kaj faris kelkajn gravajn sciigojn pri mencio de Esperanto en la naciaj ĵurnaloj. En fino de la vespero la aktoro N. Rytjkov recitis kelkajn esperantajn versaĵojn.

La 24. 2. 63 oni aranĝis vesperon, dediĉitan al memoro de fama ĉeĥoslovaka ĵurnalistoj Julius Fučík, pri kiu brilan kaj elokventan raporton faris k-do N. Danovskij. Li rakontis pri dufoja vizito de nia lando, pri lia revolucia laboro en sia patrujo. Dum la lasta milito li estis kelkfoje malliberigita kaj en la jaro 1943-a li estis mortigita de faŝistoj.

Teodoro Kulag'n



Sudafrika Respubliko estas ekonomie la plej evoluinta ŝtato en Afriko. Pli ol 70 elcentoj de la loĝantaro estas indiĝenaj afrikanoj, sed la lando estas regata nur de malgranda eŭropevena minoritato, kiu por povi konservi sian pozicion el la lando praktikas kruele la rasismon.

En la urboj oni pli ofte aŭdas anglan lingvon, sed ekster la urboj dominas afrikaanslingvo. Por esti ĉiuloke komprenata la civitano de tiu ĉi ŝtato bezonas koni du lingvojn minimume. Tio malhelpas la propagandon de Esperanto. Tute prave samideano Colin Beckford diras, ke al la invito lerni Esperanton oni ofte aŭdas la ŝablonan respondon: „Mi jam lernas du lingvojn; nun vi proponas, ke mi lernu ankoraŭ trian!“

En Sudafrika Respubliko nun aktivis ĉirkaŭ 70 geesperantistoj. Ili loĝas en diversaj urboj, kiuj troviĝas je longaj distancoj. Tio malhelpas la oftajn renkontigojn de la esperantistoj. Regule kunvenas ĉiumonate nur la esperantista societo en la metropola urbo Johanesburgo. Ĝi estas oficiale fondita en 1952 kaj festis sian 10-jaran datrevenon de la fondiĝo nur antaŭ kelkaj monatoj (la 2-an de septembro 1962). La festo daŭris tri tagojn. Al Johanesburgaj samideanoj gastis tiuokaze grupo da esperantistoj el Lourenco Marques, Mozambiko. Oni prezentis filmojn, Esperanto-teatraĵetojn, muzikon ktp. Tamen la plej serioza afero pri kiu oni diskutis estas la jam sentata bezono de landa Esperanto-asocio, ĉar esperantistaj grupoj ekzistas ankaŭ en kelkaj aliaj urboj: Cape Town, Durban, Port Elizabeth k. a. Landa asocio koordinos la fortojn de ĉiuj grupoj kaj aktivuloj kaj tute la rezultoj estos pli konsiderindaj. Oni elektis iniciatan komitaton, kiu nun preparas statuton ktp.

La esperantistoj plejparte estas homoj progresemaj kiuj kontraŭas al la senbrida rasismo. Pruvo pri tio estas la fakto ke ili esperas nun disvastigi Esperanton ankaŭ inter la „miksrasuloj“ (idoj de blankuloj kaj nigruloj).

La elstara kaj progresema samideano Colin Beckford tre bone karakterizas la situacion en tiu lando. Li diras: „Estas damaĝe, ke ni ne povas aranĝi kunvenojn por ĉiuj rasoj samtempe kaj samloke, ĉar la registaro ne permesas tion. Pro tio ni ne povas uzi Esperanton kiel intencis Zamenhof; intertempe la eŭropana klubo provas varbi novajn membrojn kaj same faras la „miksrasula“ klubo. Eble venos la tempo kiam estos nur unu klubo por ĉiuj rasoj. Ni esperas pri tio“.

Esperu kaj energie agadu por tiu afero, karaj sudafrikaj gesamideanoj!

Canko Murgin

La Urbestro de Bolonjo, Italio, Hon. Giuseppe Dozza, donacis omaĝe al la Esperanto-grupo Ĉinan Antologion kune kun Bulgara volumo, akompanante la donacon per jena ĝentila letero: „Al Sinjoro Prezidanto de la Esperanto-Grupo-Bologna.

Mi ricevis la aldonitajn Esperanto-librojn pri Ĉinio kaj Bulgario, kie la lernado de Internacia Lingvo estas multe disvastigata.

Mi permesas ilin donaci omaĝe al la Bolonja Esperanto-grupo kune kun la plej varmaj bondeziroj por fruktodona laboro kaj ĉiam pli profunda aktiveco.

Kun aparta konsidero, akceptu miajn plej korajn salutojn.

Giuseppe Dozza

ORGANIZA VIVO

JAMBOL. La jarkunvenon ĉeestis reprezentantoj de la Distrikta Komitato de BKP k-do Dimitar Kraleŭ kaj de la Distrikta Konsilantaro k-do Jordan Pavlov. Tio estis publika esprimo de intereso al la agado de la societo en la urbo.

La plej bela atingo en la agado de la societo dum la pasinta jaro estas la organizitaj kursoj por Esperanto sub la gvidado de k-do Simeon Hesapčiev. Jen ankoraŭ kelkaj faktoj el la sukcesa agado de la societo: propagandaj vitrinaj, plivastigitaj esperanta korespondado, manifestacioj je la 1-a de majo kaj 9-a de septembro, nomita strato „Esperanto“ en Jambol, 43 disaŭdigoj de la urba radioservo, labortago helpe al la agrikultura kooperativo, venditaj 5000 markoj-brikoj, kaj aliaj.

Sed estas ankaŭ mankoj. Pasintjare la estraro ne organizis ekskursojn, amuzvesperojn. Ĝi nesufiĉe laboris kun aktivuloj. Ĝi ne organizis la kolektadon de abonoj por esperantaj revuoj. Forte malpligrandiĝis la abonantoj de „Bulgara Esperantisto“ — dum la 1962 jaro ili estis 62 kaj ĉi-jare nur 22. Tio estas serioza, grava manko.

La ĉeestantoj serioze pridiskutis la agadon de la societo. La gekamaradoj A. Stojanov, B. Kuŝev, P. Kraĉeva, St. Andreev, St. Popov J. Dimitrov, D. Bogdev, G. Jordanov, P. Bakalov kaj aliaj parolis zorgoplene pri la mankoj en la agado kaj faris proponojn.

Fine k-do D. Kraleŭ, reprezentanto de la Distrikta Komitato de BKP, salutis la jambolajn esperantistojn kaj bondeziris estonte novajn sukcesojn.

G. Jordanov

ST. DIMITROV. K-do Boris Drenski legis la jaran raporton de la estraro. La societo jam nombras 100 membrojn. Estis aranĝitaj belega koncerto, ekskursoj, vitrinoj, dudekkvin anoj vizitis la kongreson en Burgas. Tamen plej granda akiraĵo estas la nova propra klubejo de la societo. Tion oni atingis dank' al la helpo de la Urba Komitato de BKP, kiu ne nur disponigis al ni klubejon, sed ankaŭ ŝrankojn, belajn seĝojn k. t. p.

Oni elektis novan estraron kun prezidanto B. Drenski kaj sekretario, la juna esperantisto Todor Georgiev. Kun entuziasmo oni ankaŭ akceptis programon por rekonto de la gastoj de 48-a Universala Kongreso ekskursantaj al Rila Monaĥejo.

La societo laboras por atingi la kontrolajn ciferojn de CK de BEA por pligrandigo de la societanoj, menciitaj en la januara numero de BE.

Iv. Dobrovski

KOLAROVGRAD. Dum martó okazis la jarkunveno de la urba esperantista societo „Vekigo“. Estis pritraktita la unujara agado de la societa estraro kaj de la membraro, kiu montriĝis nesufiĉe kontentiga. Tion pruvas ankaŭ la fakto, ke el 73 regulaj membroj al la jarkunveno venis nur 28. Post la kunveno multaj el la forestintoj elmontris diversajn senkulpigojn. Estas esperantistoj, kiuj ne helpas la agadon de la societo, tamen emas kritiki la estraron ekster la organizaĵo.

Malgraŭ tio la kunveno pasis bone kaj fruktodone. Estis bonaj eldiroj kaj multaj interesaj proponoj. Inter alie estis proponite aranĝi la vendadon de literaturo kaj lerniloj en la magazenoj de „Peĉatni proizvedenija“, aranĝi esperantlingvajn surskribojn de la ilustritaj poŝtkartoj kaj aliaj.

En la rezolucio ni legas pri stabiligo de la junulara sekcio, plimultigo de la membraro kaj helpo al la geesperantistoj en Preslav kaj Novi Pazar.

La kunveno sendis ankaŭ protestan telegramon al la prezidanto de Respubliko Irako pri la fiagoj de la reaktivuloj kaj salutleterojn al la CK de BEA kaj al la Urba Komitato de BKP.

Ilija Andreev

DEZIRAS KORESPOND!

ITALIO

Feliĉe Dipasquale, via Rovigo 3, Torino — kun bulgaroj.

Monteski Karlo, via Pratisolo 59, Skandiano, Regio Emilia — kun bulgaroj.

MAROKO

Charles Thollet (60-jara), rue Mohamed el Amradui 64, Kenitra — dez. havi familian loĝadon en Sofio dum la kongreso. Interesatoj bonvolu skribi al li, indikante la prezon en franca mono.

ĈINIO

Ko Jinsan, str. Binhai 58, provinco Guangdong, urbo Haikou.

POLLANDO

Józef Kubiak (26-jara), ul. Slowackiego 14, Września (voj. Poznańskie) — hun bulgaraj geesperantistoj; PM, PI.

Izabela Błażejczak, ul. Kasprowicza 87, Nietków (pow. Zielona Góra) — kun knabinoj kaj knaboj el Bulgario pri filmoj, sporto, muziko; PM, PI, fotoj de aktoroj.

PO LA MONTODOMO ESPERANTO

Fervojista E-societo, Sofio	51 lv.
Ĉina Esperanto-Ligo (libroj)	50 "
J. Atanasov, K. Kânev, P. Danĉev,	
B. Danĉev, P. Denev — ĉiuj el v.	
Polsko Kosovo (Ruse)	15 "
Akademiano V. Georgiev, Sofio	6 "
G. Belev	5 "
D. Simeonov, Sofio	5 "
Ivan Canev	4 "
A. Grigorov	3 "
L. Kânĉeva, Pazarĝik	5 "
N. Vasilev, v. Panĉarevo (K.ust.)	3 "

Novaj fondintoj:

Fervojista Esperanto-societo en Sofio
Ivan Canev el Sofio
Ĉina Esperanto — Ligo Pruntoj kaj donacoj

Donacis librojn por la starigota montodoma biblioteko: Esperanto-Grupo kaj Herman Dey el Solingen (Okcidenta Germanio) kaj A. Perelman el Simferopol (USSR). Al ĉiuj donacintoj ni kore dankas.

Turista sekcio „Esperanto“

1. BULGARO KAJ BULGARIANO

K-do At. Krumov el Plovdiv direktas al ni la jenan demandon:

En Esperanto ekzistas la vortoj: albano, bulgaro, italo, franco, anglo, serbo, armeno ktp...

Ĉu oni povas uzi la vortojn: bulgariano, albaniano, italiano ktp.? Se oni povus uzi ilin, ĉu ekzistas ia diferenco inter ili kaj inter la unuaj vortoj? Se oni ne povus uzi ilin — kial? Ĉu la vorton **bulgariano** ekzemple oni ne povas uzi en senco **bulgara ŝtatanano** (bulgara ŝtatanano povus esti homo, kiu estas bulgaro aŭ ne bulgaro)? Mi petas klarigojn pri tiuj demandoj.

Respondo. Bulgaroj estas homoj el kiuj konsistas la bulgara nacio. Ili loĝas en Bulgario. Bulgario estas lando sur Balkana Duoninsulo, kun difinitaj limoj en kiu loĝas plejparte bulgaroj. Sed en ĝi loĝas ankaŭ minoritatoj: turkoj, hebreoj, armenoj ktp. Ili formas la bulgaran popolon (aŭ pli ĝuste bulgarian popolon). Tio estas la tuta loĝantaro de la lando. Ni scias, ke unu el la signifoj de la sufikso **an** estas loĝanto: vilaĝano, sofiano, eŭropano, amerikano. El tiuj ekzemploj estas tute klare, ke nenio malhelpas, ke oni diru ankaŭ „bulgariano“ kio signifas loĝanto de lando Bulgario, senkonsidere de la nacieco. Same ni povus diri italiano, skandinaviano, norvegiano. Ja oni uzas pollandano, finlandano, ktp. Ja ni tute senhezite uzas la vorton jugoslaviano. Tiu povus esti laŭ nacieco macedono, kroato, sloveno ktp. Ĉiuj anoj de tiuj ĉi nacioj loĝas en ia lando nomata Jugoslavio, do ili estas **jugoslavianoj**.

La vorto ŝtatanano entenas pli da politika-jura karaktero. Ĝi proksimiĝas al la vorto civitano, kiu signifas homon, kiu havas politikajn kaj publikajn rajtojn kaj devojn en iu ŝtato. Kiel mi jam menciis **an** signifas loĝanton, do — **bulgariano** havas signifon de **loĝanto de la lando Bulgario** kaj de nenio pli. Ĝi ne estas identa kun la vortoj ŝtatanano aŭ civitano.

2. RESPONDI, RESPONSI

La sama kamarado demandas:

En vortaro de Atanas Nikolov, eldonita 1942 j. sur paĝo 387 oni trovas la vorton **respondi**, kiu signifas — отговарям, давам отговор, отворявам. En la sama paĝo oni ankaŭ trovas la vorton — **reponsi**, verbo, kiun oni tradukas — отговарям, вземам върху си отговорност, отговорен съм. Sed en bulgara-esperanta vortaro de 1961 j. mi ne trovas tian vorton, kial? En tia vortaro ekzistas la vorto **respondeculo**, kiu vorto laŭ mia opinio estas malpli taŭga, ol la vorto **reponsulo**, kial do? Mi petas vian respondon pri tiu demando.

Respondo. La vorto **responsi** ne ekzistas en la lasta bulgara-Esperanta vortaro, ĉar ĝi ne estas oficiala. Anstataŭ ĝin oni proponas la vorton respondi formita regule laŭ la Esperanta vortfarado kaj bone esprimanta la ideon. Oni (precipe okcidentlandaj esperantistoj) penas enkonduki vortojn kiel procezo (anst. procedo aŭ proceso), aprezo (anst. pritakso), iuj eĉ aoreco (el la franca apprécier) ktp. Ja ĉio-ĉi estas balasto por la lingvo, malfaciligas ĝin kaj kreas danĝeron pro dialektigo. Ni ne povas esti adeptoj de tiaj tendencoj kiuj minacas la unuecon de la lingvo kaj de la movado kaj malhelpas ties plivastiĝon kaj plifortiĝon.

Violin Oljanov

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

KANTO DE LA 19-a TEJO-KONGRESO

MUZIKA Petr Musala

Ni ai-ve-nis el la for-raĵoj kun mal-sa-maj mo-roj kaj pa-rol'
 sed ni ĝu-as ti-un ĉar-man ran-don man en ma-ne kun for-ti-ka vol'
 Refreno
 Vra-ca, Vra-ca, urb' de Te-jo, vig-la. ĉar-ma kon-gre-se.
 -jo Vra-ca -ma kon-gre-se. -jo

Ni alvenis el la fo-aj landoj
kun malsamaj moroj kaj parol',
sed ni ĝuas tiun ĉarman randon
man'-en-mane kun fortika vol'.

Vraca, Vraca, urb' e TEJO — }
vigla, ĉarma kongresejo! }²
Ja per unu lingvo — Esperanto
ni kantadas en komuna ĥor'
de l' Frateco kaj de l' Paco kanton —
la militon for, militon for!

Vraca, Vraca, urb' de TEJO — }
vigla, ĉarma kongresejo! } 2

Gejunuloj ! Dancu, ridu, ludu
sub la verda albo de l' Balkan'
kaj ne preterlasu vi konklude
flamajn kisojn de l' junula am'!

Vraca, Vraca, urb' de TEJO — }
vigla, ĉarma kongresejo! }

Zefiro